

Raportas Kubo 3 novajn kazojn de Covid-19 kaj neniun forpason



Havano, jun 23 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi lando, oni konfirmis 3 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2318 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 217 pacientoj. Aliaj 267 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanato.

En tiu tago oni analizis 2148 samplajn, el kiuj 3 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 151 381 studitajn samplajn kaj 2318 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. Unu estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 88,6% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj. Totalo de 161 estas venintaj el eksterlando. El la totalo konfirmita 54,1% estis sen simptomaj.

El la novaj kazoj 1 estis viro por 50,4% el la totalo. El la 2318 pacientoj diagnozitaj, 108 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 85, kun indikilo de morteco je 3,67% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 18 rilate la mortecindikilon en la regiono. Restas la nombro de du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 2123 jam rekuperiĝintaj (10 pliaj hieraŭ). Unu paciento estas en kriza stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas pli ol 8 milionojn da kontaĵitoj pro tiu ĝi malsano kun indikilo de morteco je 5,25 % dum la amerika regiono havas iom pli ol 49,0% el ĝiuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 4 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,05%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo la aŭtoritatoj insistas pri la bezono plu gardi la fizikan izoliĝon por eviti revigliĝon de la nova kronviruso. Pri tio la havanaj aŭtoritatoj pli strike kontrolas la sekurecajn regulojn epidemiologiajn.

En 14 kubaj provincoj oni ne raportis kazojn dum la lastaj du semajnoj kaj pro tio komenciĝis la rekuperiĝa etapo en tiuj provincoj, escepte en Havano, la solaj, kiuj daŭre raportas novajn kazojn de Covid-19.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/226546-raportas-kubo-3-novajn-kazojn-de-covid-19-kaj-neniun-forpason>



Radio Habana Cuba